Riassunti di tesi italiane sull'Esperanto. Resumoj de italaj disertacioj pri Esperanto

Commissione Istruzione FEI-Eduka Komisiono de IEF

1) Salvatore Tiraboschi. *Appunti attorno al problema della lingua universale*. Tesi. Genova: Università degli Studi di Genova. 1970.

Salvatore Tiraboschi. *Rimarkoj pri la problemo de la universala lingvo*. Disertacio. Ĝenovo: Universitato de Ĝenovo. 1970.

Riassunto: La tesi discute vari progetti di lingue universali e argomenta che il progetto di Zamenhof ha attraversato in breve le medesime fasi storiche delle sviluppo della lingua universale: restaurazione del latino, poi lingua "a priori" e puramente combinatoria; infine, lingua "a posteriori". L'autore mette in guardia contro l'idea chimerica di una lingua essenzialmente dotta, in quanto una lingua può diventare universale o internazionale solo per la sua semplicità di apprendimento e la possibilità di un suo uso vivo e quotidiano. Da questo punto di vista, la stessa struttura delle parole dell'Esperanto è un mezzo mnemotecnico per ricordarle, mentre la lingua dei dotti è solo il punto d'arrivo di un processo di crescita. Interessante la rilettura della storia della linguistica in una prospettiva che privilegia il nominalismo e l'asserzione (anti-Herderiana) che tutti i linguaggi sono artificiali, in quanto creati ad arte dall'uomo.

Resumo: La disertacio pridiskutas diversajn projektojn de universala lingvo kaj argumentas, ke la projekto de Zamenhof mallonge trairis la samajn evoluajn stadiojn de la universala lingvo: restarigo de la latina, sekve "apriora" kaj pure kombina lingvo; fine, "aposteriora" lingvo. La aŭtoro atentigas nin kontraŭ la ĥimera ideo de lingvo esence dokta, ĉar lingvo povas iĝi universala aŭ internacia nur pro sia simpleco de lernado kaj sia viva ĉiutaga uzebleco. Ekzemple, la vorta strukturo mem en Esperanto estas memorararta rimedo, dum klera lingvo estas nur atingota punto en kreska proceso. Interesa estas la relegado de la lingvistika historio en perspektivo, kiu privilegias nominalismon, kaj la aserto (kontraŭ Herder), ke ĉiuj lingvoj estas artefaritaj, ĉar arte kreitaj fare de homoj.

2) Gianfranco Cardone. *Il movimento esperantista in Italia. Storia dei rapporti tra Stato e Chiesa*. Tesi. Torino: Università degli Studi di Torino. 1974.

Gianfranco Cardone. *La esperantista movado en Italio*. *Historio de la rilatoj inter Ŝtato kaj Eklezio*. Disertacio. Turino: Universitato de Turino. 1974.

Riassunto: La tesi argomenta che l'Esperanto ha dato il suo contributo all'ecumenismo, oltre che come strumento di reciproca comprensione, anche con la sua "interna ideo." Inoltre in Italia prima dell'avvento del fascismo vi furono numerosi e cordiali incontri tra esponenti del mondo socialista e cattolico. La tesi presenta le maggiori figure di esperantisti cattolici e la storia dei rapporti tra IKUE, IKA e UECI.

Resumo: La disertacio argumentas, ke Esperanto kontribuis al ekumenismo, ne sur kiel ilo de reciproka interkompreno, sed ankaŭ pere de sia "interna ideo." Krome en Italio antaŭ la alveno de fascismo multnombris

kaj elkoris la rilatoj inter samideanoj de la socialisma kaj de la katolika mondo. La disertacio prezentas la plej elstarajn figurojn de katolikaj esperantistoj kaj la historion de la rilatoj inter IKUE, IKA kaj UECI.

3) Fulvio Stoja. *L'Esperanto ed il suo carattere sociologico*. Tesi. Cosenza: Istituto Superiore di Scienze Sociali. 1983.

Fulvio Stoja. *Esperanto kaj ĝia sociologia eco*. Disertacio. Cosenza: Supera Instituto de Sociaj Sciencoj. 1983.

Riassunto: La tesi argomenta che l'uso di una lingua artificiale è possibile, in quanto siamo lontani dai Romantici che ritenevano che la lingua fosse il prodotto del popolo che la parla, mentre essa è un fenomeno sociale che non obbedisce a leggi biologiche, non nasce spontanea, ma si evolve secondo la volontà, il bisogno e la cultura degli uomini. Da questo punto di vista, artificiali sono anche il sanscrito e il neoebraico. E l'esperanto risponde ad un preciso bisogno sociale sentito da tempo di avere un mezzo di comunicazione adeguato a portata di tutti. L'autore descrive l'applicazione dell'Esperanto nei diversi campi della vita sociale (dai media all'università) ed è particolarmente sensibile alla questione del plurilinguismo, in quanto scrive in una regione plurilingue come la Calabria. Interessante la descrizione dell'esperimento della scuola "Oltresavio" di Cesena per la maniera, in cui l'insegnamento dell'Esperanto si è armonizzato con le altre materie con mutuo beneficio.

Resumo: La disertacio argumentas, ke la uzo de artefarita lingvo eblas, ĉar ni estas malproksimaj de la Romantikoj, kiuj opiniis, ke lingvo estas produkto de la popolo, kiu parolas ĝin, dum ĝi estas socia fenomeno, kiu ne obeas biologiajn leĝojn, ne naskiĝas spontanee, sed evoluas laŭ la volo, la bezono kaj la kulturo de la homoj. El tiu ĉi vidpuntko artefaritaj estas ankaŭ la sanskrita kaj la nov-hebrea. Kaj Esperanto respondas al preciza socia bezono, jam delonge sentita havi taŭgan komunikilon uzeblan fare de ĉiuj. La aŭtoro priskribas la aplikadon de Esperanto al la diversaj kampoj de socia vivo (ekde komunikiloj al universitatoj) kaj precipe atentas pri la temo de plurlingvismo, ĉar li skribas en plurlingva regiono kiel Kalabrio. Estas interesa la priskribo de la eskperimento de la lernejo "Oltresavio" en Cesena pro la maniero, en kiu la instruado de Esperanto harmoniiĝis kun aliaj lern-objektoj kun reciproka advantaĝo.

4) Giovanni Pala. *Raffronto tra alcuni aspetti delle lingue Inglese e Esperanto nel ruolo di "lingua ausiliaria internazionale"*. Tesi. Cagliari: Università degli Studi di Cagliari. 1985.

Giovanni Pala. *Komparo inter kelkaj aspektoj de la angla kaj de Esperanto en la rolo de "internacia helpa lingvo"*. Disertacio. Cagliari: Universitato de Cagliari. 1985.

Riassunto: La tesi argomenta che storicamente fattori esterni hanno promosso il predominio successivo di diverse lingue ausiliarie, senza tuttavia mai arrivare ad una conoscenza meno che superficiale per la maggior parte della popolazione. Per cui l'autore si domanda quanto le caratteristiche intrinseche (struttura grammaticale e lessicale) di una lingua possano influire sulla migliore padronanza nel suo uso come lingua ausiliare. A questo scopo, la tesi procede al raffronto delle strutture dell'inglese e dell'esperanto, considerate entrambe come lingue vive, per evidenziare paradigmi che possono rendere più o meno facile l'apprendimento

e più o meno spontanea la produzione linguistica. Dall'analisi svolta, l'esperanto risulta possedere in misura elevata queste caratteristiche.

Rezumo: La tezo argumentas, ke historie eksteraj faktoroj antaŭenigis la sinsekvan dominadon de kelkaj helpaj lingvoj, sen tamen neniam atingigi al la plejmulto de la loĝantaro pli ol surfaca scipovo. Do la aŭtoro scivolas, kiom multe la enaj trajtoj (gramatika kaj leksika strukturo) de iu lingvo povas influi pli plenan posedon en ĝia uzado kiel helpa lingvo. Por ĉi tiu celo, la tezo komparas la strukturojn de la angla kaj esperanto, ambaŭ konsiderataj kiel vivaj lingvoj, por reliefigi paradigmojn, kiuj povas igi la lernadon pli aŭ malpli facila kaj lingvan produktadon pli aŭ malpli spontanea. Laŭ la analizo, esperanto ŝajnas havi ĉi tiujn ecojn en granda kvanto.

5) Paola Pruzzi. *Lingue naturali e lingue artificiali: la sintassi dell'inglese e dell'esperanto*. Tesi. Pavia: Università degli Studi di Pavia. 1991.

Paola Pruzzi. *Naturaj lingvoj kaj artefaritaj lingvoj: la sintakso de la angla kaj de esperanto*. Disertacio. Pavia: Universitato de Pavia. 1991.

Riassunto: La tesi applica al confronto diretto tra l'inglese e l'esperanto l'esame comparativo delle proprietà linguistiche, che John Hawkins (1986) ha proposto per l'inglese e il tedesco. Seguendo un punto di vista universale-tipologico, Hawkins giunge a generalizzazioni sui contrasti osservati, riguardanti tra gli altri l'ordine delle parole e le relazioni grammaticali, basandosi sugli aspetti semantici delle variazioni morfologiche e sintattiche. Il confronto tra brani letterari nella versione originale inglese con quella tradotta in esperanto, permette di concludere che l'esperanto presenta strutture sue proprie al pari di una lingua naturale. Inoltre, la lingua di Zamenhof risulta tipologicalmente più affine al tedesco che non all'inglese per una maggiore libertà nell'ordine dei costituenti della frase e in generale per una minore discrepanza tra sintassi e semantica.

Resumo: La disertacio aplikas al la rekta komparo inter la angla kaj Esperanto la komparadan esploron de lingvaj ecoj, kiun John Hawkins (1986) proponis por la angla kaj la germana. Sekvante universalan-tipologian vidpunkton, Hawkins atingas ĝeneraligojn pri la observitaj kontrastoj, koncernantaj interalie vort-ordon kaj gramatikajn rilatojn, sin bazante sur la semantikaj aspektoj de morfologiaj kaj sintaksaj variaĵoj. La komparo inter pecoj de literaturaj verkoj en la originala angla versio kun ties esperantaj tradukoj, ebligas konkludi, ke Esperanto havas siajn proprajn strukturojn same kiel natura lingvo. Krome, la lingvo de Zamenhof estas tipologie pli simila al la germana ol al la angla pro sia pli granda libereco ordigi la konstituantajn partojn de la frazo kaj ĝenerale pro sia malpli granda nekongrueco inter sintakso kaj semantiko.

6) Marina Màzzero. *Le lingue nella Comunità Europea con particolare riguardo all'inglese*. Tesi. Torino: Università degli Studi di Torino. 1991.

Marina Màzzero. *La lingvoj ene de la Eŭropa Komunumo kun aparta prikonsidero pri la angla.* Disertacio. Turino: Universitato de Turino. 1991.

Riassunto: La tesi argomenta che il plurilinguismo diventa un obiettivo di vitale importanza con la prospettiva dell'abolizione delle barriere protezionistiche tra gli stati membri della Comunità Europea nel 1993. L'autrice

analizza i motivi politici, ideologici e culturali che hanno indotto la Comunità Europea a non abbandonare questo principio, nonostante i suoi costi finanziari ed organizzativi. Chiedendosi fino a che punto l'inglese possa funzionare da lingua franca neutrale in Europa e quale sia invece la sua "potenza colonizzatrice", la tesi afferma che l'esperanto sembra essere l'unica lingua artificiale potenzialmente in grado di assolvere al ruolo di lingua veicolare per la Comunità.

Resumo: La disertacio argumentas, ke plurlingveco fariĝas esenca celo en la perspektivo de forigo de protektismaj baroj inter la membroŝtatoj de la Eŭropa Komunumo en 1993. La aŭtorino analizas la politikajn, ideologiajn kaj kulturajn kialojn, kiuj ne permesis, ke la Komunumo forlasu ĉi tiun principon, malgraŭ ĝiaj financaj kaj organizaj kostoj. Sin demandante kiom multe la angla povas funkcii kiel neŭtrala intergenta lingvo en Eŭropo kaj kio estas, fakte, ĝia "koloniiga povo", la disertacio asertas, ke Esperanto ŝajnas esti la sola artefarita lingvo potenciale kapabla plenumi la rolon de vehikla lingvo por la Komunumo.

7) Sonia Emanuelli. *Le lingue artificiali: storia, tipologia e identità linguistica*. Tesi. Napoli: Istituto Universitario Orientale. 1992.

Sonia Emanuelli. *Artefaritaj lingvoj: historio, tipologio kaj lingva identeco*. Disertacio. Napolo: Universitata Instituto pri Orientaj Studoj. 1992.

Riassunto: La tesi si concentra su progetti di lingue artificiali concepiti come lingue internazionali ausiliarie. Una particolare attenzione è rivolta all'esperanto, come unica lingua artificiale che si sia dimostrata realmente valida sotto il profilo dell'applicabilità nel campo delle comunicazioni internazionali e dell'attività letteratia. Nella quasi totalità delle lingue artificiali si può riconoscere un modello di tipo sostanzialmente agglutinante. In appendice, l'autrice esamina la questione delle lingue artificiali nel quadro dell'evoluzione storica della concezione degli universali del linguaggio, che dall'800 in poi sono legati soprattutto alla dimensione cognitiva.

Resumo: La disertacio koncentriĝas sur projektoj de artefaritaj lingvoj konceptitaj kiel internaciaj helpaj lingvoj. Aparta atento estas donata al Esperanto, kiel la sola artefarita lingvo, kiu estis pruvata vere valida koncerne al sia aplikebleco en la kampo de internaciaj komunikadoj kaj literatura kreado. En preskaŭ ĉiuj artefaritaj lingvoj estas rekonebla esence aglutina modelo. En la apendico, la aŭtorino ekzamenas la problemon de artefaritaj lingvoj kadre de la historia evoluo de la koncepto de lingva universaleco, kiu de la 19-a jarcento estas ĉefe ligita al la kona dimensio.

8) Silvia Lacquaniti. *Il funzionamento di una lingua pianificata: l'Esperanto, problemi teorici*. Tesi. Roma: Università degli Studi di Roma "La Sapienza". 1993.

Silvia Lacquaniti. *Funkciado de planlingvo: Esperanto, teoriaj problemoj*. Disertacio. Romo: Universitato de Romo "La Sapienza". 1993.

Riassunto: La tesi discute la particolarità dell'esperanto in relazione a diversi metodi di classificazione delle lingue pianificate. Ad esempio, la classificazione di Couturat e Leau (1903) considera le lingue pianificate più o meno vicine alle lingue naturali a secondo dell'origine del loro patrimonio lessicale e del loro tipo di regole grammaticali. Nel caso dell'esperanto, il legame con le lingue naturali è più evidente, poiché riflette una situazione storica di convergenza culturale tra le lingue europee. Il metodo di classificazione di Blanke, invece,

prende in considerazione il tipo di diffusione e il ruolo di comunicazione svolto effettivamente da ciascun progetto, con le crescenti differenziazioni nell'ambito della comunità dei parlanti (comparabili allo stadio di "vita semiologica" di una lingua, secondo Fernand de Saussure). Il bilinguismo di bambini segna la fase finale del passaggio a una lingua vera e propria da parte di un sistema nato come artificiale. Mentre molti progetti, come l'ido, hanno raggiunto lo status di semi-lingua, l'esperanto è l'unico che, secondo i criteri indicati da Blanke, può essere considerato una lingua.

Resumo: La disertacio diskutas la apartecon de Esperanto rilate al malsamaj metodoj de klasifikado de planitaj lingvoj. Ekzemple, la klasifik-metodo de Couturat kaj Leau (1903) konsideras planitajn lingvojn pli malpli proksimaj al naturaj lingvoj laŭ la origino de leksiko kaj gramatikaj reguloj. En la kazo de Esperanto, la ligo kun naturaj lingvoj estas pli evidenta, ĉar ĝi reflektas historian situacion de kultura konverĝado inter eŭropaj lingvoj. Aliflanke, la klasifika metodo de Blanke konsideras la specon de disvastigo kaj la rolon de komunikado efektive plenumitan fare de ĉiu projekto, kun la kreskantaj diferencoj ene de la komunumo de parolantoj (kompare al la akirita etapo de "semiologia vivo" de lingvo, laŭ Fernand de Saussure). La dulingveco de infanoj markas la finan fazon de transiro al reala lingvo fare de sistemo naskita kiel artefarita. Dum multaj projektoj, kiel ido, atingis duon-lingvan statuson, Esperanto estas la sola, kiu povas esti konsiderata lingvo, laŭ la kriterioj indikitaj de Blanke.

9) Federico Miatto. *Aspetti politici del problema linguistico nella dimensione locale, nazionale, sovrannazionale*. Tesi. Torino: Università degli Studi di Torino. 1997.

Federico Miatto. *Politikaj aspektoj de la lingva problemo en loka, nacia, supernacia dimensio*. Disertacio. Turino: Universitato de Turino. 1997.

Riassunto: La tesi argomenta che solo una trasformazione dell'Europa in federazione permetterebbe alle minoranze in essa esistenti di ottenere quei margini di tutela che negli attuali stati nazionali difficilmente otterranno. Basandosi sull'esperimento di Herbert Frank, il testo presenta come un'allettante e razionale possibilità l'uso dell'Esperanto come mezzo ausiliare di comunicazione tra i popoli, preferibilmente in una federazione.

Resumo: La disertacio argumentas, ke nur transformado de Eŭropo en federacion permesus al la minoritatoj, kiuj ekzistas en ĝi, akiri tiujn marĝenojn de protekto, kiujn ili malfacile akirus en la nunaj naciaj ŝtatoj. Surbaze de la eksperimento de Herbert Frank, la teksto prezentas kiel allogan kaj racian eblecon la uzon de Esperanto kiel helpa rimedo por komuniki inter popoloj, prefereble en federacio.

10) Sergio Spelgatti. *Esperanto e lingue storico-naturali*. Tesi. Milano: Università Cattolica di Milano. 1997.

Sergio Spelgatti. *Esperanto kaj histori-naturaj lingvoj*. Disertacio. Milano: Katolika Universitato de Milano. 1997.

Riassunto: La tesi discute l'affermazione di André Martinet, secondo cui l'Esperanto è una lingua europea. In realtà, secondo l'autore, è predominante in essa una struttura morfologica estremamente lontana da quella

flessiva impiegata per lo più in molte lingue europee. Anche se Zamenhof presentò la sua lingua servendosi di concetti tipicamente latini, è possibile ritenere che ebbe intuizione di una concezione grammaticale totalmente diversa. Piuttosto, come sostiene Claude Piron, la comunità che ha adottato l'esperanto parla in gran parte una lingua flessiva e non ha sviluppato tutte le potenzialità latenti della lingua. Ma chi ha progettato l'esperanto ha pensato al mondo e soprattutto alle sue molteplici lingue. Le appendici esaminano i casi della lingua franca e dell'ebraico moderno.

Resumo: La disertacio diskutas la aserton de André Martinet, ke Esperanto estas eŭropa lingvo. Fakte, laŭ la aŭtoro, en ĝi regas morfologia strukturo ekstreme malproksima de la fleksia plejparte uzata en multaj eŭropaj lingvoj. Kvankam Zamenhof prezentis sian lingvon uzante tipe latinajn konceptojn, eblas kredi, ke li intuiciis tute alian gramatikan koncepton. Pli ĝuste, kiel argumentas Claude Piron, la komunumo, kiu adoptis Esperanton, plejparte parolas fleksian lingvon kaj pro tio ne evoluigis ĉiujn latentajn potencialojn de la lingvo. Sed tiu, kiu desegnis Esperanton, pensis pri la mondo kaj ĉefe pri ĝiaj multnombraj lingvoj. La apendicoj ekzamenas la kazojn de la mediteranea intergenta lingvo kaj de la moderna hebrea.

11) Federico Gobbo. *Il dilemma dell'esperanto. Tra vocazione ausiliaria e naturalizzazione*. Tesi. Torino: Università degli Studi di Torino. 1998.

Federico Gobbo. *La Esperanta dilemo*. *Inter helpa celo kaj naturaliĝo*. Disertacio. Turino: Universitato de Turino. 1998.

Riassunto: La tesi argomenta che il processo di naturalizzazione dell'Esperanto è quasi completato e che gli manca solo un luogo suo proprio dove i parlanti possano vivere insieme e far fare alla lingua quel salto di qualità che la renda una genuina L1, in analogia con l'ebraico moderno. Ma la vocazione ausiliaria, veicolata dall'ideologia, impedisce la formazione di un nazionalismo esperantista. Per Gobbo un luogo proprio per l'Esperanto potrebbe essere l'Unione Europea, ma gli esperantisti potrebbero temere di perdere la specificità culturale acquisita nel tempo.

Resumo: La disertacio argumentas, ke la naturiĝa procezo de Esperanto estas preskaŭ kompleta kaj ke mankas al ĝi nur sia loko propra, kie la parolantoj povus vivi kune kaj havigi al la lingvo tiun kvalitan antaŭeniron, kiu igus ĝin aŭtentika L1, analoge al la moderna hebrea. Sed la helpa celo, ideologie antaŭenpuŝita, malfaciligas la formiĝon de Esperanta naciismo. Por Gobbo taŭga loko por Esperanto povus esti Eŭropa Unio, sed esperantistoj eble timus perdi sian kulturan specifecon akiritan dum la tempo.

12) Giuseppina Piscopo. *Ricadute metalinguistiche dell'apprendimento dell'Esperanto in alunni di scuola media*. Tesi. Roma: Università degli Studi di Roma "La Sapienza". 1999.

Giuseppina Piscopo. *Metalingvistikaj konsekvencoj de la lernado de Esperanto en mez-lernejaj lernantoj.* Disertacio. Romo: Universitato de Romo "La Sapienza". 1999.

Riassunto: La tesi di psicolinguistica evolutiva mira a valutare gli effetti dell'apprendimento scolastico dell'Esperanto sullo sviluppo di alcune abilità metalinguistiche, ossia condotte che denotano la capacità di

riflettere sulle strutture e sul funzionamento del linguaggio, sia nei confronti di lingue straniere che nei confronti della lingua madre. Il campione studiato è di alunni della scuola media, che hanno seguito un corso d'Esperanto della durata di un intero anno scolastico. Nella introduzione alla ricerca Piscopo ripercorre gli esperimenti tendenti a dimostrare la propedeuticità dell'Esperanto allo studio di altre lingue, come ad esempio quelli di Padeborn o di Elisabetta Vilisics-Formaggio. La sua ricerca conferma l'ipotesi di partenza, evidenziando una superiorità nel punteggio totale dei test da parte dei soggetti che avevano studiato l'Esperanto. Questa superiorità riguarda in particolare la parte metalinguistica e tende a crescere con il tempo dedicato allo studio dell'Esperanto.

Resumo: La disertacio de evolua psikolingvistiko celas kalkuli la efektojn de la lernado de Esperanto en lernejo sur la disvolviĝo de kelkaj metalingvistikaj kapabloj, alimaniere dirite, kondutoj, kiuj indikas la kapablon pripensi la strukturojn kaj la funkciadon de la lingvo, rilate al fremdaj lingvoj kaj al la patrina lingvo mem. La studita specimeno konsistas el mezlernejaj gelernantoj, kiuj sekvis Esperantan kurson je la daŭro de tuta lernojaro. En la enkonduko al sia esplorado Piscopo prikonsideras la eksperimentojn, kiuj celis pruvi kiel Esperanto estas propedeŭtika al la lernado de aliaj lingvoj, kiel ekzemple tiujn de Padeborn aŭ de Elisabetta Vilisics-Formaggio. Ŝia propra esplorado konfirmas la komencan hipotezon, substrekante superecon en la totala ekzamena poentaro fare de la individuoj, kiuj estis studintaj Esperanton. Tiu ĉi supereco koncernas precipe la metalingvistikan parton kaj tendence kreskas laŭ la tempon dediĉitan al la studado de Esperanto.

13) Filippo De Agostini. *Diritti linguistici in Europa*. Tesi. Roma: Università degli Studi di Roma "La Sapienza". 2001.

Filippo De Agostini. *Lingvaj rajtoj en Eŭropo.* Disertacio. Romo: Universitato de Romo "La Sapienza". 2001.

Riassunto: L'obiettivo della tesi è quello di esporre la strada percorsa dagli anni sessanta, in cui è iniziata una profonda riflessione sulle minoranze linguistiche, e quella che si deve ancora percorrere perché tutte le lingue possano continuare ad esistere, in particolare in ambito europeo. In questa prospettiva di lotta per il mantenimento di uno stato di biodiversità linguistica e di multiculturalismo, che aiuti a prevenire conflitti come quello jugoslavo, il testo esamina in particolare la Carta Europea delle Lingue Minoritarie o Regionali, approvata dal Consiglio d'Europa nel 1992. Un esempio finale mostra i dibattiti particolarmente intensi, che si sono avuti in Francia in relazione a questo strumento internazionale. La tesi non parla di Esperanto.

Resumo: La disertacio celas montri la vojon laŭiritan ekde la sesdekaj jaroj, kiam komenciĝis profunda pripensado pri lingvaj minoritatoj, kaj la ankoraŭ laŭirendan vojon, por ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu, precipe en Eŭropo. En ĉi tiu perspektivo de lukto por la konservado de lingva biodiverseco kaj multkulturismo, kiu povus malhelpi konfliktojn kiel la jugoslavan, la teksto ekzamenas precipe la Eŭropan Ĉarton de Minoritataj aŭ Regionaj Lingvoj, aprobitan fare de la Konsilio de Eŭropo en 1992. Fina ekzemplo montras la precipe intensajn debatojn okazintajn en Francio rilate al ĉi tiu internacia instrumento. La disertacio ne parolas pri Esperanto.

14) Fabio Cabrini. Universal Networking Language: *dal mito della Lingua Universale al "traduttore" globale.* Tesi. Milano: Università Cattolica di Milano. 2001.

Fabio Cabrini. Universal Networking Language*: ekde la mito de Universala Lingvo al tutmonda "tradukilo".* Disertacio. Milano. Katolika Universitato de Milano. 2001.

Riassunto: La tesi parte da un'analisi storica dei progetti di lingua universale (incluso l'Esperanto) per arrivare al progetto "Universal Networking Language" delle Nazioni Unite come risposta al problema specifico delle traduzioni in Internet. L'autore argomenta che questo progetto di interlingua elettronica cerca di realizzare una globalizzazione del sapere senza rinunciare al multilinguismo e al multiculturalismo.

Resumo: La disertacio ekas per historia analizo de projektoj de universala lingvo (inkluzive de Esperanto) por alveni al la projekto "Universala Interreta Lingvo" de la Unuiĝintaj Nacioj kiel respondo al la specifa problemo de interreta tradukado. La aŭtoro argumentas, ke ĉi tiu projekto de elektronika interlingvo celas atingi tutmondigon de scioj sen rezigni pri multlingveco kaj multkulturismo.

15) Michele Gazzola. *La relazione fra costi economici e costi politici del multilinguismo nell'Unione Europea.* Tesi. Milano: Università Commerciale "Luigi Bocconi". 2002.

Michele Gazzola. *La rilato inter ekonomiaj kaj politikaj kostoj de multlingveco en Eŭropa Unio*. Disertacio. Milano: Komerca Universitato "Luigi Bocconi". 2002.

Riassunto: La tesi esamina come la diversità linguistica europea e le politiche nazionali di salvaguardia della stessa possono entrare in contrasto con il principio della libera circolazione delle merci e delle persone, che è stato fin dal principio il motivo dominante nella costruzione comunitaria. Attraverso una meticolosa descrizione del funzionamento delle istituzioni europee, l'autore argomenta che il multilinguismo è "politicamente necessario" e ne calcola i costi, proponendo come soluzione possibile un "multilinguismo controllato." La tesi non parla di Esperanto.

Resumo: La disertacio ekzamenas kiel eŭropa lingva diverseco kaj la naciaj politikoj por protekti ĝin povas kontraŭstari la principon de libera movado de varoj kaj homoj, kiu ekde la komenco estis la ĉefa kialo en la konstruado de la Komunumo. Pere de tre detala priskribo de la funkciado de la eŭropaj institucioj la aŭtoro argumentas, ke multlingveco estas "politike necesa" kaj kalkulas ĝiajn kostojn, proponante kiel eblan solvon "kontrolatan multlingvecon." La disertacio ne parolas pri Esperanto.

16) Francesca Parisi. *Multilinguismo nel trattamento automatico del linguaggio naturale: UNL tra interlingua e linguaggio per computer*. Tesi. Milano: Libera Università di Lingue e Comunicazione. 2002.

Francesca Parisi. *Plurlingveco en aŭtomata traktado de natura lingvo: Universala Reta Lingvo inter interlingvo kaj komputila lingvo*. Disertacio. Milano: IULM. 2002.

Riassunto: La tesi esamina i problemi legati all'analisi e alla produzione di linguaggio naturale attraverso l'utilizzo di metodi computazionali. Il progetto UNL, che consente applicazioni nel campo della traduzione automatica, ha come fondamento l'interlingua. Si presenta cioè come un linguaggio artificiale autonomo ed indipendente che funge da passaggio tra due linguaggi naturali. L'autrice ripercorre la storia della traduzione automatica, scrivendo che nel 1933 il pioniere russo Petr Trojanskij aveva proposto un progetto basato sulla

codifica e interpretazione delle funzioni grammaticali usando simboli universali sulla falsariga dell'Esperanto. Sul finire degli anni '80 ritornano in auge sistemi ad approcci interlingua. Ad esempio, nel progetto DLT (Distributed Language Translation) in Olanda i testi dovevano essere trasmessi da un terminale all'altro in un linguaggio intermedio (costruito secondo le linee guida dell'Esperanto). Secondo l'autrice, però, l'UNL si differenzia da altri linguaggi artificiali, quali l'Esperanto, in quanto la conoscenza dei suoi vocaboli e sintassi non è necessaria, data la presenza di un software apposito per la conversione di UNL da e in linguaggi naturali.

Resumo: La disertacio ekzamenas la problemojn ligitajn al la analizado kaj produktado de natura lingvo pere de komputadaj metodoj. La projekto Universala Reta Lingvo, kiu ebligas aplikadojn en la kampo de aŭtomata tradukado, havas interlingvon kiel fundamenton. Alivorte, ĝi prezentas sin kiel aŭtonoman kaj sendependan artefaritan lingvon, kiu agas kiel trairilo inter du naturaj lingvoj. La aŭtoro laŭiras la historion de maŝina tradukado, skribante, ke en 1933 la rusa pioniro Petr Trojansky proponis projekton bazitan sur la kodado kaj interpretado de gramatikaj funkcioj uzante universalajn simbolojn laŭ la modelo de Esperanto. En la malfruaj 1980-aj jaroj, sistemoj kun interlingvaj aliroj estis revivigitaj. Ekzemple, en la projekto DLT (Distribuita Lingvo-Tradukado) en Nederlando la tekstoj devis esti sendataj de unu terminalo al alia pere de intera lingvo (konstruita laŭ la gvidlinioj de Esperanto). Laŭ la aŭtorino, tamen, la Universala Reta Lingvo diferencas de aliaj artefaritaj lingvoj, kiel Esperanto, ĉar la kono de ĝiaj vortoj kaj sintakso ne estas necesa, dank'al la ekzisto de laŭcela programaro por la transigo de UNL el kaj al naturaj lingvoj.

17) Anna Maria Dall'Olio. *Osservazioni sulla storia e sulla struttura dell'Esperanto con particolare riferimento alla lingua italiana*. Tesi. Pisa: Università degli Studi di Pisa. 2004.

Anna Maria Dall'Olio. *Rimarkoj pri la historio kaj strukturo de Esperanto kun aparta referenco al la itala lingvo*. Disertacio. Pisa: Universitato de Pizo. 2004.

Riassunto: La tesi sottolinea l'influenza dell'italiano sull'Esperanto, mettendone però in luce anche le diversità.

Resumo: La disertacio substrekas la influon de la itala sur Esperanto, reliefigante tamen ankaŭ la diferencojn inter la du lingvoj.

18) Mariella Costantini. *Esperantofonia precoce: uno studio sulla lunghezza media dell'enunciato*. Tesi. Roma: Università degli Studi di Roma "La Sapienza". 2004.

Mariella Costantini. *Fruatempa Esperantofonio: studo pri la averaĝa longeco de frazo*. Disertacio. Romo: Universitato de Romo "La Sapienza". 2004.

Riassunto: La tesi considera l'effetto del plurilinguismo sullo sviluppo della lunghezza media dell'enunciato in parole da parte di soggetti plurilingui, tra i 10 e i 52 mesi, rispetto a soggetti monolingui italiani e inglesi. Tutti e sei i soggetti della ricerca sono esposti precocemente, da uno dei genitori, all'Esperanto. Dallo studio emerge che anche i parlanti di esperanto usufruiscono dei benefici del plurilinguismo e l'esperanto sembra comportarsi a tutti gli effetti come le altre lingue naturali. Infatti la lunghezza media dell'enunciato in parole dell'esperanto risente della frequenza d'uso e dall'intensità dei contatti che i soggetti hanno con il genitore che lo parla. La

tesi evidenzia anche problemi, come il fatto che generalmente sono i padri, tendenzialmente più assenti, e non le madri a parlare esperanto con i figli, oppure l'insufficiente diffusione di libri in esperanto per bambini.

Resumo: La disertacio konsideras la efikon de plurlingveco rilate al la evoluo de la averaĝa longeco de frazo, konsiderata laŭ vortoj, fare de plurlingvaj subjektoj, aĝaj inter 10- kaj 52-monatoj, kompare kun italaj kaj anglaj unulingvaj subjektoj. Ĉiuj ses subjektoj de la esplorado estis frue alparolitaj en Esperanto, fare de unu el la gepatroj. La disertacio montras, ke Esperanto-parolantoj ankaŭ profitas je la avantaĝoj de plurlingveco kaj Esperanto ŝajnas konduti tute same kiel aliaj naturaj lingvoj. Fakte la averaĝa longeco de la frazo en Esperanto, konsiderata laŭ vortoj, estas influata fare de la ofteco de uzado kaj de kontaktoj inter la subjektoj kaj la gepatro, kiu parolas ĝin. La tezo ankaŭ substrekas problemojn, kiel ekzemple la fakton, ke kutime estas la patroj, ĝenerale pli ofte forestantaj, kaj ne la patrinoj, kiuj parolas Esperanton kun siaj infanoj, aŭ la nesufiĉan disvastigon de Esperanto-libroj por infanoj.

19) Chiara Fabbri. *Il ruolo dell'Esperanto nella nuova Europa*. Tesi. Parma: Università degli Studi di Parma. 2005.

Chiara Fabbri. *La rolo de Esperanto en la nova Eŭropo*. Disertacio. Parmo: Universitato de Parmo. 2005.

Riassunto: La tesi discute la proposta degli esperantisti di introdurre l'Esperanto nelle istituzioni europee, esaminando la situazione linguistica dell'Unione Europea e i fattori che potrebbero facilitarne o impedirne l'introduzione.

Resumo: La disertacio diskutas la proponon fare de esperantistoj enkonduki Esperanton en eŭropajn institucioj n, ekzamenante la lingvan situacion de Eŭropa Unio kaj la faktorojn kiuj povus faciligi aŭ malfaciligi ĝian enkondukon.

20) Maria Chiara Felloni. *Il plurilinguismo istituzionale all'interno dell'Unione Europea*. Progetto di ricerca CRUI-Vigoni-DAAD. 2005.

Maria Chiara Felloni. *Institucia plurlingveco ene de Eŭropa Unio*. Esplor-projekto CRUI-Vigoni-DAAD. 2005.

Riassunto: Il rapporto analizza la situazione attuale delle lingue di lavoro nella politica linguistica dell'Unione Europea e le possibili soluzioni circa la gestione del multilinguismo culturale per mostrare come sia difficile trasporre un concetto teorico di politica linguistica in una applicazione pratica. Si tende sempre a privilegiare in pratica l'efficienza economica a scapito del rispetto del plurilinguismo, mentre il sistema democratico dovrebbe garantire la tutela della diversità di ogni paese. L'Unione Europea dovrebbe quindi lavorare nelle lingue di tutti gli stati membri.

Resumo: La raporto analizas la nunan situacion de laborlingvoj en la lingva politiko de Eŭropa Unio kaj la eblajn solvojn rilate al la administrado de kultura multlingveco por montri kiom malfacilas traduki teorian koncepton de lingva politiko en praktikan aplikon. Ekonomia efikeco estas ĉiam praktike konsiderata pli grava ol respekto de multlingvismo, kvanvam la demokratia sistemo devus garantii la protektadon de la diverseco de ĉiu lando. Eŭropa Unio devus do funkcii en la lingvoj de ĉiuj membroŝtatoj.

21) Carlo Minnaja. *Un secolo di traduzioni letterarie dall'italiano in Esperanto (1890-1990)*. Tesi. Venezia: Università Ca' Foscari di Venezia. 2005.

Carlo Minnaja. *Jarcento da literaturaj tradukoj el la itala al Esperanto (1890-1990)*. Disertacio. Venecio: Universitato Ca 'Foscari de Venecio. 2005.

Riassunto: La tesi argomenta che la produzione letteraria in Esperanto rappresenta l'anima della lingua, soffermandosi particolarmente sulle traduzioni letterarie dall'italiano a partire dai contributi di Daniele Marignoni fino all'antologia dei poeti italiani del Novecento presentata nel 1990.

Resumo: La disertacio argumentas, ke la literatura produktado en Esperanto reprezentas la animon de la lingvo, kun precipa fukuso pri literaturaj tradukoj el la itala ekde la kontribuoj de Daniele Marignoni ĝis la antologio de italaj poetoj de la dudeka jarcento prezentita en 1990.

22) Nadia Agostini. *Il contributo del "Baretti" al dibattito linguistico del primo Novecento*. Tesi. Trento: Università degli Studi di Trento. 2007.

Nadia Agostini. *La kontribuo de "Baretti" al la lingva debato je la komenco de la dudeka jarcento*. Disertacio. Trento: Universitato de Trento. 2007.

Riassunto: La tesi situa le proposte linguistiche della rivista *Il Baretti* (1924-8) di Piero Gobetti nel quadro del dibattito contemporaneo sull'alfabetizzazione e l'italianizzazione del popolo italiano, che vedeva tra i suoi protagonisti Antonio Gramsci. Secondo l'autrice, la condanna dell'esperanto da parte di Gramsci è legata al suo rifiuto di qualsiasi imposizione linguistica. Come una lingua nazionale poteva essere ottenuta solamente dopo che si fosse verificata una convergenza sociale e culturale tra le regioni, così anche la lingua internazionale doveva essere il frutto di un processo lento e graduale di avvicinamento reciproco. I paesi europei, guidati dall'egemonia della prestigiosa cultura sovranazionale del socialismo, dovevano condividere, in primo luogo, gli stessi valori e la stessa mentalità e solo in seguito una lingua comune, frutto di questa collaborazione.

Resumo: La disertacio situigas la lingvajn proponojn de la revuo *Il Baretti* (1924-8) de Piero Gobetti kadre de la tiama debato pri la alfabetigo kaj lingva italigo de la itala popolo, kiu havis inter siaj protagonistoj Antonio Gramsci. Laŭ la aŭtorino, la kondamno de esperanto fare de Gramsci estas ligita al lia rifuzo de lingva altrudo. Same kiel nacia lingvo povus esti akirita nur post socia kaj kultura konverĝado inter la regionoj, tiel ankaŭ la internacia lingvo devus esti la rezulto de malrapida kaj laŭgrada procezo de reciproka proksimiĝo. La eŭropaj landoj, gvidataj fare de la hegemonio de la prestiĝa superanacia kulturo de socialismo, devus unue kunpartigi la samajn valorojn kaj la saman pensmanieron kaj nur poste komunan lingvon, kiel rezulton de ĉi tiu kunlaborado.

23) Paolo Ciafardone. *Aspetti linguistici e traduttologici nell'opera di J.R.R. Tolkien.* Tesi. Chieti-Pescara: Università degli Studi "G. d'Annunzio". 2008.

Paolo Ciafardone. ***Lingvaj kaj tradukaj aspektoj en la verkaro de J.R.R. Tolkien.*** **Disertacio. Chieti-Pescara: Universitato "G. d'Annunzio". 2008.**

Riassunto: La tesi presenta la passione di glottoteta di Tolkien, situandola nel contesto della storia della creazione di linguaggi artificiali (tra cui l'Esperanto) e soffermandosi soprattutto sul linguaggio elfico Quenya.

Resumo: La disertacio prezentas la lingvo-inventan pasion de Tolkien, ĝin situigante en la kuntekston de la historio de la kreado de artefaritaj lingvoj (inkluzive de Esperanto) kaj fokusante ĉefe sur la elfa lingvo Quenya.

24) Pierfrancesco Naccarato. ***L'Esperanto: la storia, la comunità, le problematiche, la lingua.*** **Tesi. Bologna: Università degli Studi di Bologna. 2009.**

Pierfrancesco Naccarato. ***Esperanto: historio, komunumo, problemoj, lingvo.*** **Disertacio. Bolonjo: Universitato de Bolonjo. 2009.**

Riassunto: La tesi presenta le discussioni, che hanno accompagnato la storia dell'esperanto. Tra i dibattiti interni si possono ricordare quelli tra schemisti e naturalisti, come quelli tra sostenitori della componente ideologica o di quella puramente linguistica. Tra le controversie esterne spiccano gli argomenti sollevati contro l'esperanto in una prospettiva ideologica e politica e i rapporti con i fautori di altre lingue pianificate, come ido e interlingua. La tesi presenta anche la comunità esperantista, soffermandosi in particolare sulla regione Emilia-Romagna, la Biblioteca Nazionale di Esperanto di Massa e internet.

Resumo: La disertacio prezentas la diskutojn, kiuj akompanis la historion de Esperanto. Inter la enaj debatoj ni povas citi tiujn inter skemistoj kaj naturecistoj, same kiel tiujn inter subtenantoj de ĝia ideologia aŭ pure lingva karaktero. Inter la eksteraj polemikoj elstaras la argumentoj formulitaj kontraŭ Esperanto el ideologiaj kaj politikaj vidpunktoj kaj la rilatoj kun la proponantoj de aliaj planlingvoj kiel ido kaj interlingvo. La tezo prezentas ankaŭ la Esperanto-komunumon, fokusante precipe sur la regiono Emilia-Romagna, la Nacia Esperanto-Biblioteko de Massa kaj interreto.

25) Federico Gobbo. ***Adpositional Grammars. A multilingual grammar formalism for NLP*****. Tesi. Varese: Università degli Studi dell'Insubria. 2009.**

Federico Gobbo. ***Apoziciaj gramatikoj. Mult-lingva gramatika formaligita modelo por la komputila traktado de naturaj lingvoj*****. Disertacio. Varese: Universitato de Insubrio. 2009.**

Riassunto: La tesi di dottorato in inglese parte dall'intuzione di Leibniz, che considerava inseparabili le due domande "Come sono fatte le leggi del pensiero umano?" e "Come si può formalizzare la conoscenza linguistica?" Da questo punto di vista, l'Esperanto si può considerare una risposta alla seconda domanda. Gobbo stesso ne sviluppa il pensiero grazie all'adozione di grammatiche apposizionali ovvero di un formalismo grammaticale multilingue, che offre una descrizione generale di come gli uomini organizzino il proprio spazio mentale attraverso la scelta di particolari costruzioni morfologiche e sintattiche, La tesi mostra che le grammatiche apposizionali hanno una solida base cognitiva e sono computabili. L'uso di una lingua regolare e quasi naturale quale l'Esperanto, che è riuscito a formarsi una comunità di parlanti, ha permesso di testare la

fattibilità linguistica del modello, che può essere quindi generalizzato per traduzioni automatiche tra altre lingue naturali.

Resumo: La doktoriga disertacio en la angla ekas el la intuicio de Leibniz, kiu konsideris ne separeblaj la du demandojn “Kiel faratas la leĝoj de la homa penso?” kaj “Kiel lingvistika kono povas esti formaligita?” El tiu vidpunkto, Esperanto povas esti konsiderata respondo al la dua demando. Gobbo mem disvolvigas la penson pri ĝi dank’al adopto de apoziciaj gramatikoj aŭ de mult-lingva gramatika formaligita modelo, kiu ĝenerale priskribas kiel homoj organizas sian mensan spacon pere de la elekto de specifaj morfologiaj kaj sintaksaj aranĝoj. La disertacio montras, ke apoziciaj gramatikoj havas firman konan bazon kaj estas komputeblaj. La uzo de regula kaj preskaŭ natura lingvo kiel Esperanto, kiu sukcesis formi al si parolantan komunumon, permesis testi la lingvistikan fareblecon de la modelo, kiu povas do esti ĝeneraligita por maŝina tradukado inter aliaj naturaj lingvoj.

26) Irene Grigatti. *Un percorso alla scoperta della fonetica delle lingue inventate, tra Zamenhof e Star Trek*. Tesi. Torino: Università degli Studi di Torino. 2009.

Irene Grigatti. *Itinero al la malkovro de la fonetiko de inventitaj lingvoj*, inter Zamenhof kaj *Star Trek*. Disertacio. Turino: Universitato de Turino. 2009.

Riassunto: La tesi confronta l’Esperanto e il Klingon della serie televisiva *Star Trek*, sottolineando come siano totalmente diversi da un punto di vista fonetico. Zamenhof intendeva creare una lingua comprensibile a tutti, mentre il linguista americano Mark Okrand voleva una lingua che sembrasse a tutti aliena. L’esperanto si basa sul principio secondo cui a un simbolo corrisponde un unico suono (usando anche il “cappellino” presente nelle macchine da scrivere dell’epoca, basate sull’alfabeto francese). Al contrario, il Klingon è stato costruito in modo tale da evitare la semplicità. L’inventario fonetico dell’Esperanto non prevede suoni che potrebbero essere difficili da riprodurre come consonanti retroflesse, ovulari e faringali. Nell’alfabeto Klingon, invece, c’è una grande distanza logica tra il simbolo ed il suono corrispettivo. L’allofono di alcune consonanti è inserito nell’alfabeto come lettera a sé ed è presente, ad esempio, la particolare combinazione di una consonante occlusiva alveolare sorda aspirata.

Resumo: La disertacio komparas Esperanton kaj la Klingona lingvo de la televida serio *Stela Vojaĝo* (*Star Trek*), substrekante kiel ili tute diferencas laŭ la fonetika vidpunkto. Zamenhof intencis krei lingvon kompreneblan al ĉiuj, dum la usona lingvisto Mark Okrand volis lingvon, kiu devis ŝajni fremda al ĉiuj. Esperanto baziĝas sur la principo, ke unu simbolo respondas al unu sono (uzante ankaŭ la "ĉapeleton", kiu troviĝis en la tiamaj tajpiloj, bazitaj sur la franca alfabeto). Male, la Klingona estis konstruita kun la celo eviti simplecon. La fonetika inventaro de Esperanto ne inkluzivas sonojn malfacile reprodukteblajn kiel retrofleksajn, ovulajn kaj faringajn konsonantojn. En la Klingona alfabeto, male, estas granda logika distanco inter la simbolo kaj la responda sono. La alofono de iuj konsonantoj aperas en la alfabeto kiel memstara litero kaj troviĝas, ekzemple, la aparta kombinaĵo de konsonanto samtempe plosiva, alveolara, senvoĉa kaj aspiracia.

27) Stefania Rinaldi. *Saussure esperantista*. Tesi. Parma: Università degli Studi di Parma. 2010.

Stefania Rinaldi. *Saussure esperantisto*. Disertacio. Parmo: Universitato de Parmo. 2010.

Riassunto: La tesi descrive la figura di René de Saussure, matematico ed esperantista ginevrino, fratello del padre della linguistica moderna Ferdinand de Saussure. Rinaldi presenta in particolare il suo ruolo di riformatore, che intendeva trovare un compromesso tra l'Esperanto e l'Ido, e la sua concezione dell'Esperanto come lingua pianificata.

Resumo: La disertacio priskribas la figuron de René de Saussure, Geneva matematikisto kaj esperantisto, frato de la patro de moderna lingvistiko Ferdinand de Saussure. Rinaldi precipe prezentas lian rolon kiel reformanton, kiu intencis trovi kompromison inter Esperanto kaj Ido, kaj lian koncepton de Esperanto kiel planlingvo.

28) Sabrina Chetta. *Lingue ausiliarie e tesi di naturalezza*. Tesi. Milano: Università degli Studi di Milano 2010.

Sabrina Chetta. *Helpaj lingvoj kaj tezo pri natureco*. Disertacio. Milano: Universitato de Milano 2010.

Riassunto: La tesi propone un'analisi comparata delle strutture morfologiche e fonologiche di lingue pianificate ausiliarie, come l'Esperanto, l'ido, il volapük e il neo, alla luce di diverse teorie della naturalezza. Dal punto di vista morfologico, ad esempio, Esperanto ed ido mantengono un maggior grado di naturalezza, in quanto posseggono un numero di prefissi relativamente basso rispetto ai suffissi. Ma la sistematica debolezza della distinzione tra morfemi lessicali e derivazionali tipica dell'Esperanto è quasi assente tra le lingue del mondo e quindi innaturale. L'evoluzione dell'Esperanto si può considerare un ingresso nella fase di vita semiologica della lingua, nell'accezione di De Saussure, in quanto l'uso da parte di una comunità sta generando una nuova norma.

Resumo: La disertacio proponas komparan analizon de la morfologiaj kaj fonologiaj strukturoj de helpaj planlingvoj, kiel Esperanto, ido, volapuko kaj neo, laŭ diversaj teorioj de natureco. El la morfologia vidpunkto ekzemple, Esperanto kaj Ido gardas pli grandan naturecon, ĉar ili havas relative malaltan nombron da prefiksoj kompare al sufiksoj. Sed la sistema malforteco de la distingo inter leksikaj kaj derivaj morfemoj, kiu estas tipa de Esperanto, maloftas inter la mondaj lingvoj kaj do estas malpli natura. La evoluo de Esperanto povas esti konsiderata eniro en la fazon de semiologia vivo de la lingvo, en la senco de De Saussure, ĉar uzado fare de komunumo estas generanta novan normon.

29) Anna Rondelli. *Baha'i ed Esperanto. Alla ricerca della lingua universale*. Tesi. Parma: Università degli Studi di Parma. 2011.

Anna Rondelli. *Bahaanoj kaj Esperanto. Serĉante la universalan lingvon*. Disertacio. Parmo: Universitato de Parmo. 2011.

Riassunto: La tesi argomenta che la minoranza religiosa Baha'i si è avvicinata all'Esperanto nella sua ricerca di una lingua ausiliaria universale in grado di generare una comunicazione paritaria tra tutti i popoli. Rondelli descrive in modo particolare le figure di Marta Root, Lidia Zamenhof e dell'islamista italiano Alessandro Bausani.

Resumo: La disertacio argumentas, ke la Bahaa religia minoritato alproksimiĝis al Esperanto en sia serĉo de universala helpa lingvo, kapabla generi egalan komunikadon inter ĉiuj popoloj. Rondelli priskribas precipe la figurojn de Marta Root, Lidia Zamenhof kaj de la itala islamisto Alessandro Bausani.

30) Paola Giovangrandi. *L'Esperanto: La lingua che avvicina i cuori*. Tesi. Pavia: Università degli Studi di Pavia. 2011.

Paola Giovangrandi. *Esperanto: La lingvo, kiu alproksimigas la korojn*. Disertacio. Pavio: Universitato de Pavio. 2011.

Riassunto: La tesi argomenta che, grazie ai principi fondamentali di necessità e di sufficienza nella formazione delle parole, l'Esperanto stimola gli alunni a prestare attenzione ai diversi affissi e ad apprezzare la semplicità dei composti, evitando la prolissità tipica di altre lingue.

Resumo: La disertacio argumentas, ke dank'al siaj fundamentaj principoj de neceseco kaj sufiĉeco en vorto-farado, Esperanto atentigas la lernantojn pri la diversaj afiksoj kaj estimigas al ili la simplecon de la kunmetaĵoj, evitante la malkoncizecon tipan de aliaj lingvoj.

31) Sara Di Pietrantonio. *L'insegnamento delle lingue straniere come politica pubblica: il caso italiano*. Tesi. L'Aquila: Università degli Studi dell'Aquila. 2011.

Sara Di Pietrantonio. *La instruado de fremdaj lingvoj kiel publika politiko: la itala kazo*. Disertacio. L'Aquila: Universitato de L'Aquila. 2011.

Riassunto: La tesi argomenta che le politiche linguistiche educative che favoriscono l'egemonia della lingua inglese su tutte le altre sollevano problemi di equità in termini economici (come dimostrato dal rapporto di François Grin), oltre a mettere potenzialmente in pericolo la diversità linguistico-culturale in Europa. Vi viene discusso in particolare in caso italiano. Secondo l'autrice, molti esperti ammettono il valore dell'Esperanto come soluzione ottimale ai problemi di efficienza comunicativa e linguistica nell'UE. Ma i pregiudizi che lo circondano non lo rendono una soluzione politicamente accettabile nel breve termine, nonostante il suo valore chiave nel lungo termine come ottimo alleato del multilinguismo.

Resumo: La disertacio argumentas, ke edukaj lingvopolitikoj, kiuj favoras la hegemonion de la angla lingvo super ĉiuj aliaj, kreas problemojn de egaleco en ekonomiaj terminoj (kiel pruvas la raporto de François Grin), kaj povas ankaŭ endanĝerigi la lingvan kaj kulturan diversecon en Eŭropo. Estas ĉi tie pridiskutata precipe la itala kazo. Laŭ la aŭtorino, multaj spertuloj agnoskas la valoron de Esperanto kiel optimuma solvo de la problemoj de komunika kaj lingva efikeco en EU. Sed la antaŭjuĝoj, kiuj ĉirkaŭas ĝin, ne igas ĝin politike akceptebla solvo en la proksima estonto, malgraŭ ĝia ŝlosila valoro en pli malproksima estonto kiel bonega aliancano de plurlingveco.

32) Rosalba Galati. *Osservazioni sull'esperanto con particolare riferimento alla morfologia*. Tesi. Palermo: Università degli Studi di Palermo. 2012.

Rosalba Galati, *Rimarkoj pri Esperanto kun aparta referenco al morfologio*. Disertacio. Palermo: Universitato de Palermo. 2012.

Riassunto: La tesi si propone lo scopo di fornire una descrizione della lingua esperanto, utilizzando le categorie della linguistica teorica. L'Esperanto viene presentato come lingua agglutinante, che contiene tuttavia anche elementi propri delle lingue isolanti.

Resumo: La disertacio celas doni priskribon de la lingvo Esperanto laŭ la kategorioj de teoria lingvistiko. Esperanto estas prezentata kiel aglutina lingvo, kiu tamen enhavas ankaŭ elementojn specifajn al izolaj lingvoj.

33) Antonella Strano. *L'invenzione linguistica per la comunicazione internazionale e l'Esperanto*. Tesi. Palermo: Università degli Studi di Palermo. 2013.

Antonella Strano, *Lingva eltrovado por internacia komunikado kaj Esperanto*. Disertacio. Palermo: Universitato de Palermo. 2013.

Riassunto: La tesi presenta i maggiori progetti di lingue pianificate per la comunicazione internazionale, descrivendo in particolare l'origine e la diffusione dell'Esperanto. L'autrice ne sottolinea i vantaggi rispetto all'inglese sul piano dell'equità linguistica e della facilità di apprendimento anche per non occidentali, ma mette in luce il mancato supporto da parte delle autorità.

Resumo: La disertacio prezentas la ĉefajn projektojn de lingvoj planitaj por internacia komunikado, priskribante precipe la originon kaj disvastigon de Esperanto. La aŭtorino substrekas ĝiajn avantaĝojn compare al la angla rilate al lingva egaleco kaj facileco de lernado ankaŭ por ne-okcidentanoj, sed reliefigas la mankon de subteno fare de la aŭtoritatoj.

34) Lucrezia Di Sebastiano. *Storia culturale della lingua Esperanto in Cina.* Tesi. Venezia: Università Ca' Foscari di Venezia. 2014.

Lucrezia Di Sebastiano. *Kultura historio de la lingvo Esperanto en Ĉinio*. Disertacio. Venecio: Universitato Ca' Foscari de Venecio. 2014.

Riassunto: La tesi argomenta che l'Esperanto è sempre riuscito a reinventarsi per ritagliarsi un ruolo importante nelle fasi di svolta della storia cinese, dal primo trentennio del Novecento fino ai giorni nostri. Particolarmente interessante e completa è la ricerca fino agli anni 70, mentre è meno sviluppata l'ultima parte.

Resumo: La disertacio argumentas, ke Esperanto ĉiam sukcesis reinventi sin mem por ludi gravan rolon en la turnopunktoj de ĉina historio ekde la unuaj tri jardekoj de la dudeka jarcento ĝis la nuntempo. Precipe interesa kaj kompleta estas la esplorado ĝis la sepdekaj jaroj, dum la lasta parto estas iom skiza.

35) Cesare Novara. *Proposte di riconoscimento legale dell'Esperanto in Italia*. Tesi. Parma: Università degli Studi di Parma. 2015.

Cesare Novara. *Proponoj por jura agnosko de Esperanto en Italio*. Disertacio. Parmo: Universitato de Parmo. 2015.

Riassunto: La tesi esamina le principali proposte di legge presentate al parlamento italiano riguardo all'Esperanto durante la storia dell'Italia repubblicana. In allegato sono presentate copie dei testi delle proposte di legge dagli Atti Parlamentari.

Resumo: La disertacio ekzamenas la ĉefajn leĝ-proponojn pri Esperanto prezentitajn al la itala parlamento dum la historio de la itala respubliko. Aldonitaj estas kopioj de la tekstoj de la leĝaj proponoj el la Parlamentaj Aktoj.

36) Irene Caligaris. *Una lingua per tutti. Una lingua di nessun paese. Una ricerca sul campo delle identità esperantiste.* Tesi. Torino: Università degli Studi di Torino. 2015.

Irene Caligaris. *Lingvo por ĉiuj. Lingvo de neniu lando. Surkampa esplorado pri esperantistaj identecoj.* Disertacio. Turino: Universitato de Turino. 2015.

Riassunto: La tesi è una monografia di sociologia del linguaggio, che esplora le attitudini al multilinguismo dei parlanti Esperanto. Particolare rilevanza in questo contesto viene data al fenomeno dei madrelingua. La ricerca sul campo si è svolta attraverso questionari scritti sottoposti a partecipanti del Festival Giovanile Internazionale di Esperanto e del Congresso Italiano di Esperanto del 2014, con supplemento di colloquio diretto.

Resumo: La disertacio estas monografio pri lingva sociologio, kiu esploras la penson pri multlingveco fare de Esperanto-parolantoj. Precipe substrekata en tiu kunteksto estas la fenomeno de la denaskuloj. La surkampa esplorado okazis pere de skribaj demandaroj plenigitaj fare de partoprenantoj de la Internacia Junulara Festivalo kaj de la Italia Kongreso de Esperanto en 2014, kun la plia helpo de rekta parolado.

37) Maria Elena Ramelli. *Jules Verne esperantista?* Tesi. Parma: Università degli Studi di Parma. 2015.

Maria Elena Ramelli. *Ĉu Jules Verne estis esperantisto?* Disertacio. Parmo: Universitato de Parmo. 2015.

Riassunto: La tesi esamina il passaggio dalle lingue fantastiche inserite nei romanzi fantastici di Verne alla scelta dell'esperanto per una missione politica in Congo nel suo romanzo incompiuto *Voyage d'études*. Ramelli argomenta che l'interesse per l'esperanto segnala come Verne vedesse nella molteplicità e differenza tra i popoli una ricchezza per l'umanità, pur all'epoca di crescenti nazionalismi e dell'imperialismo coloniale.

Resumo: La disertacio esploras la transiron el la fantaziaj lingvoj en la fantaziaj romanoj de Verne al la elekto de esperanto por politika misio en Kongon en sia lasta nefinita romano *Etud-vojaĝo*. Ramelli argumentas, ke la intereso pri esperanto signalas kiel Verne vidis en la plureco kaj malsameco inter la popoloj riĉecon por la homaro, eĉ en epoko de kreskantaj naciismoj kaj de kolonia imperiismo.

38) Veronica Passudetti. *Lingue e grammatiche fantastiche nella letteratura italiana del Novecento.* Tesi. Venezia: Università Ca' Foscari di Venezia. 2015.

Veronica Passudetti. *Fantastaj lingvoj kaj gramatikoj en la itala literaturo de la dudeka jarcento.* Disertacio. Venecio: Universitato Ca' Foscari de Venecio. 2015.

Riassunto: La tesi argomenta che alla base del modo di concepire una lingua immaginaria da parte di Tommaso Landolfi, Lia Wainstein e Diego Marani sia possible rinvenire l'influsso delle più importanti teorie linguistiche del Novecento. I tre autori, infatti, avevano tutti frequentato corsi di linguistica. In particolare, la "lingua acquatica" nel romanzo *L'interprete* di Marani (2004) si ricollega ad echi del dibattito sulla natura innata del linguaggio e alla nozione di "grammatica universale" di Chomsky. La tesi parla dell'esperanto nella parte introduttiva sulle lingue artificiali e poi in relazione all'europanto di Marani.

Resumo: La disertacio argumentas, ke en la maniero, en kiu Tommaso Landolfi, Lia Wainstein kaj Diego Marani konceptis siajn imagitajn lingvojn, videblas la influo de la plej gravaj lingvistikaj teorioj de la dudeka jarcento. Fakte, ĉiuj el la tri aŭtoroj partoprenis en lingvistikaj kursoj. Ekzemple, la "akva lingvo" en la romano *La interpretisto* (2004) de Marani ligiĝas al eĥoj de la debato pri la kunnaskita naturo de lingvo kaj al la nocio de "universala gramatiko" fare de Chomsky. La disertacio parolas pri esperanto en la enkonduka parto pri artefaritaj lingvoj kaj poste rilate al "europanto" de Marani.

39) Rozalia Talic. *Esperantaboco. Un nuovo alfabeto per l'Esperanto*. Tesi. Mendrisio: Scuola universitaria professionale della Svizzera italiana. 2016.

Rozalia Talic. *Esperantaboco. Nova alfabeto por Esperanto*. Disertacio. Mendrisio: Universitata profesia lernejo de itala Svislando. 2016.

Riassunto: La tesi vede una contraddizione nell'alfabeto dell'Esperanto, che, usando solo l'alfabeto latino, non rispetta l'idea di internazionalità della lingua stessa. Quindi cerca di integrare graficamente tre alfabeti occidentali (quello latino della lingua croata, quello dell'Esperanto e il cirillico della zona serbo-croata) per crearne uno nuovo, come primo passo per portare l'Esperanto verso una sempre maggiore internazionalizzazione.

Resumo: La disertacio vidas kontraŭdiron en la alfabeto de Esperanto, kiu, uzante nur latinan alfabeton, ne respektas la ideon de internacieco de la lingvo mem. Do, ĝi klopodas grafike kunmeti tri okcidentajn alfabetojn (la latinan de la kroata lingvo, tiun de Esperanto kaj la cirilan de la serbokroata areo) por krei novan, kiel unuan paŝon por igi Esperanton ĉiam pli internacia.

40) Linda Bergamaschi. *Esperanto: utopia o soluzione inefficace?* Tesi. Bergamo: Università degli Studi di Bergamo. 2016.

Linda Bergamaschi. *Esperanto: ĉu utopio aŭ neefika solvo?* Disertacio. Bergamo: Universitato de Bergamo. 2016.

Riassunto: La tesi si interroga su quali siano gli ostacoli che non hanno permesso all'esperanto di diventare lingua veicolare internazionale e su quale possa essere il suo futuro, grazie all'aiuto di questionari sottoposti via posta elettronica a diversi esperantisti di nazionalità differenti. Da parte di esperantisti italiani e di altri paesi non anglofoni emerge soprattutto la consapevolezza degli ostacoli economici e politici che ne frenano l'adozione. Nessuno di loro nega la sua possibilità di affermarsi in futuro, ma il potere decisionale è nelle mani di istituzioni. Gli esperantisti inglesi, invece, tendono a sottolinare la non necessità di imparare un'altra lingua, avendo già il mondo a disposizione l'inglese come lingua franca e la possibilità di perfezionare traduttori per comunicare internazionalmente. Nella loro prospettiva, il fine dell'esperanto oggi è mantenere viva la comunità esperantista, grazie anche all'aiuto di internet, anche se l'esperanto non potrà sostituire l'inglese. Da parte sua, l'autrice, esperantista autodidatta, suggerisce che, se si riuscisse a diffondere una consapevolezza dei vantaggi dell'esperanto, si riuscirebbe ad ottenere un sostegno più significativo da parte dei cittadini.

Resumo: La disertacio sin demandas, kiuj estas la obstakloj, kiuj malhelpis esperanton iĝi internacia helpa lingvo, kaj kio Esperanto povos fariĝi en la estonteco, dank' al la helpo de demandiloj senditaj retpoŝte al esperantistoj de diversaj landoj. La konscio pri la ekonomiaj kaj politikaj obstakloj, kiuj malhelpis ĝian adopton, estas precipe forta ĉe esperantistoj el Italio kaj aliaj ne-anglalingvaj landoj. Neniu el ili neas ĝian eblon sukcesi en la estonteco, sed la decida povo estas en la manoj de la institucioj. Britaj esperantistoj, aliflanke, emas emfazi la mankon de bezono lerni alian lingvon, ĉar la mondo jam havas la anglan kiel intergentan lingvon kaj la kapablon perfektigi interretajn tradukilojn por internacia komunikado. En ilia perspektivo, la celo de esperanto hodiaŭ estas pluteni vivanta la esperantan komunumon, ankaŭ dank'al la helpo de interreto, eĉ se esperanto ne sukcesos anstataŭigi la anglan. Je sia flanko, la aŭtorino, kiu memlernis esperanton, sugestas, ke eblus akiri pli signifan subtenon fare de civitanoj, se oni pli disvastigus la konscion pri la avantaĝoj de esperanto.

41) Christian Marchesini. *La lingua universale e universalità della lingua. L'apprendibilità dell'Esperanto e gli universali linguistici*. Tesi. Padova: Università degli Studi di Padova. 2017.

Christian Marchesini. *La universala lingvo kaj lingva universaleco. La lernebleco de Esperanto kaj la lingvaj universaloj*. Disertacio. Padovo: Universitato de Padovo. 2017.

Riassunto: La tesi si pone lo scopo di verificare quanto l'Esperanto, come lingua artificiale elaborata per diventare una lingua universale con cui poter comunicare con ogni persona in qualsiasi parte del mondo, presenti effettivamente tratti di naturalezza che la rendano anche facilmente apprendibile, a prescindere dalla lingua madre del discente.

Resumo: La disertacio celas ekzameni ĝis kiu punkto Esperanto, kiel artefarita lingvo ellaborita por iĝi universala lingvo per kiu komuniki kun ĉiu homo en iu ajn parto de la mondo, efektive prezentas naturecajn trajtojn, kiuj igas ĝin facile lernebla, sendepende de la gepatra lingvo de la lernanto.

42) Sara Salis. *Lingue pianificate tra fantasia e realtà*. Tesi. Cuneo-Pinerolo: Scuola Superiore per Mediatori Linguistici "Adriano Macagno". 2017.

Sara Salis. *Planlingvoj inter fantazio kaj realo*. Disertacio. Cuneo-Pinerolo: Supera Lernejo por Lingvaj Perantoj "Adriano Macagno". 2017.

Riassunto: La tesi in italiano ed inglese argomenta che le diverse metodologie utilizzate nella creazione dell'esperanto e dell'alto valyriano della serie televisiva americana *Il Trono di Spade* riflettono i diversi scopi delle due lingue. L'autrice sottolinea anche il crescente ruolo di internet nell'invenzione e diffusione di nuovi idiomi, soprattutto a partire della creazione del Conlang Listserv nel 1991.

Resumo: La disertacio en la itala kaj en la angla argumentas, ke la diversaj metodoj uzataj en la kreado de esperanto kaj de la antikva valjria de la usona televida serio *Ludo de tronoj* respegulas la malsamajn celojn de la du lingvoj. La aŭtorino ankaŭ substrekas la kreskantan rolon de interreto en la inventado kaj disvastigado de novaj idiomoj, precipe ekde la kreado de la retpoŝta listo Conlang ("Konstruitaj lingvoj") en 1991.

43) Paola Tosato. *L'Esperanto: un progetto innovativo a carattere universale*. Tesi. Milano: Università Telematica Pegaso. 2018.

Paola Tosato. *Esperanto: noviga projekto je universala karaktero*. Disertacio. Milano: Telematika Universitato Pegaso. 2018.

Riassunto: La tesi argomenta che, quando si parla di Esperanto, si dovrebbe collegarlo ad altre tematiche inerenti alla nostra società e importanti per la vita dei cittadini del mondo. L'ideale di fondo dell'Esperanto rappresenta una forma psicologica di stimolo all'azione e oggi si può tradurre nella ricerca di un mondo sostenibile, che corregga le tendenze di una globalizzazione negativa con la capacità di inclusione e le pari opportunità. In questo l'Esperanto può avere l'appoggio di istituzioni che si fondano sui diritti umani, sulla formazione interculturale, sulla protezione della natura e sul commercio equo. La qualità dell'istruzione è sempre stata importante per i pedagoghi esperantisti, a partire da Andreo Cseh, che prese spunti dall'innovativo metodo diretto di Maximilian Berlitz nell'insegnamento dell'inglese, o dalle collaborazioni internazionali con i montessoriani. Al giorno d'oggi l'uso dell'Esperanto può andare di pari passo con l'apprendimento delle nuove tecnologie comunicative, come mostra, ad esempio, l'esperienza di Rondo Familia della FEI.

Resumo: La disertacio argumentas, ke, kiam oni parolas pri Esperanto, oni devus ĝin kunligi al aferoj, kiuj rilatas al nia socio kaj gravas por la vivo de mondcivitanoj. La baza idealo de Esperanto reprezentas psikologian formon de stimulo al agado kaj nuntempe povas esti tradukata en la serĉadon de daŭripova mondo, kiu korektu la tendencojn de negativa tutmondiĝo pere de la kapablo inkludi kaj doni egalajn ŝancojn. En tio Esperanto povas havi la subtenon de institucioj bazitaj sur homaj rajtoj, interkultura edukado, protektado de la naturo kaj justa komerco. Kvalita edukado ĉiam gravis por esperantaj pedagogoj, kiel oni bone vidas en Andreo Cseh, kiu sin inspiris al la noviga rekta metodo por la instruado de la angla fare de Maksimiliano Berlitz, aŭ en la internacia kunlaborado kun la anoj de la Montessori-metodo. Nuntempe la uzo de Esperanto povas plibonigi la lernadon de novaj komunikaj teknologioj, kiel montras, ekzemple, la sperto de Rondo Familia de la Itala Esperanto-Federacio.

44) Lorenzo Di Michele. ***Esperanto contro inglese: ragioni di una riscoperta ed impiego di una lingua ausiliaria nella comunicazione europea*****. Tesi. Roma: Libera Università degli Studi Maria Ss. Assunta. 2019.**

Lorenzo Di Michele. ***Esperanto kontraŭ la angla: kialoj por la remalkovro kaj uzado de helpa lingvo en eŭropa komunikado*****. Disertacio. Romo: LUMSA. 2019.**

Riassunto: La tesi argomenta che l'Esperanto per i suoi valori intrinseci di pace, unità e parità culturale rappresenterebbe un veicolo valido per l'Unione Europea, se fosse adottato come lingua ufficiale. Soprattutto in un contesto segnato dalla possibilità della Brexit, l'inglese perderebbe il suo status di lingua ufficiale di uno degli stati membri. Di Michele ripercorre quindi i tentativi da parte di parlamentari e presidenti dell'Unione Europea di introdurre l'Esperanto nelle politiche linguistiche europee dagli anni novanta in poi.

Resumo: La disertacio argumentas, ke Esperanto pro siaj enaj valoroj de paco, unueco kaj kultura egalrajteco reprezentus validan ilon por Eŭropa Unio, se ĝi estus adoptita kiel oficiala lingvo. Precipe en kunteksto markita de la ebleco de Briteliro, la angla perdus sian statuson kiel oficiala lingvo de unu el la membroŝtatoj. Di Michele priskribas do la klopodojn fare de parlamentanoj kaj prezidantoj de Eŭropa Unio enkonduki Esperanton en la eŭropajn lingvopolitikojn ekde la naŭdekaj jaroj.

45) Viktor Bosnjak. ***La diffusione della lingua esperanto sul territorio italiano*****. Tesi. Università Telematica "eCampus". 2019.**

Viktor Bosniak. ***La disvastigo de la lingvo esperanto en la itala teritorio.*** **Disertacio. Telematika Universitato "eCampus". 2019.**

Riassunto: La tesi argomenta che la somiglianza delle radici lessicali dell'esperanto con l'italiano e la sua motivazione umana di cercare una soluzione alle tensioni tra le etnie e le religioni hanno contribuito storicamente alla sua diffusione in Italia. Negli ultimi anni la crescente presenza dell'esperanto in internet permette di constatare un ritorno di interesse nella lingua di Zamenhof.

Resumo: La tezo argumentas, ke la simileco de la leksikaj radikoj de Esperanto kun la itala kaj ĝia homeca strebo serĉi solvon al tensioj inter etnoj kaj religioj historie kontribuis al ĝia disvastiĝo en Italio. En la lastaj jaroj, la kresko de Esperanto en interreto ebligas konstati novan interesiĝon pri la lingvo de Zamenhof.

46) Alessio Giordano. ***"La Città dell'Esperanto". Introduzione storica alla democrazia linguistica*****. Relazione finale. Macerata: Scuola di studi superiori "Giacomo Leopardi" dell'Università di Macerata. 2019.**

Alessio Giordano. ***"La Urbo de Esperanto". Historia enkonduko al lingva demokratio*****. Fina raporto. Macerata: Lernejo de superaj studoj "Giacomo Leopardi" de la Universitato de Macerata. 2019.**

Riassunto: Questa relazione finale per il Seminario della Classe di Scienze Umanistiche argomenta che la storia dei rapporti tra l'esperanto e le istituzioni internazionali nel XX secolo ci aiuta a seguire lo sviluppo dell'idea di democrazia linguistica. Lo studio parte dal progetto di fare del piccolo stato Moresnet il primo "luogo" dell'esperanto. Secondo questo progetto dell'inizio del Novecento (seguito con interesse da Zamenhof, ma

presto ostacolato dai paesi confinanti), questo micro-territorio neutrale tra Germania, Belgio e Olanda, sarebbe dovuto diventare il primo stato che utilizzasse l'esperanto come lingua ufficiale. Ripercorrendo i rapporti dell'esperanto con le istituzioni internazionali, l'autore conclude che, se si sta attualmente andando verso un'omogeneizzazione linguistica, non sia in potere all'esperanto invertire la rotta, ma potrebbe perlomeno rendere più sicura la traversata, se riuscisse a delineare in maniera precisa un progetto da seguire.

Resumo: Ĉi tiu fina raporto por la Seminario de la Kurso pri Humanismaj Sciencoj argumentas, ke la historio de la rilatoj inter esperanto kaj la internaciaj institucioj en la 20a jarcento helpas nin kompreni la evoluon de la ideo de lingva demokratio. La esplorado ekas per la projekto igi la etan ŝtaton Moresnet la unua "loko" de esperanto. Laŭ ĉi tiu projekto de la komenco de la dudeka jarcento (sekvata kun intereso de Zamenhof, sed baldaŭ malhelpota fare de la najbaraj landoj), ĉi tiu neŭtrala landeto inter Germanio, Belgio kaj Nederlando devus esti la unua ŝtato, kiu uzus Esperanton kiel sian oficialan lingvon. Laŭirante la rilatojn de Esperanto kun internaciaj institucioj, la aŭtoro konkludas, ke, se nuntempe la tendenco al lingva homogenigo estas kreskanta, Esperanto ne havas la povon inversigi tiun kurson, sed ĝi povus almenaŭ igi la transiron pli sekura, se ĝi povus imagi sekvendan planon en preciza maniero.

47) Paola Mura. *L'uguaglianza dei popoli attraverso la lingua: il caso dell'Esperanto.* Tesi. Sassari: Università degli Studi di Sassari. 2019.

Paola Mura. *Egaleco inter popoloj pere de lingvo: la kazo de Esperanto*. Disertacio. Sassari: Universitato de Sassari. 2019.

Riassunto: La tesi argomenta che il senso più profondo dell'Esperanto si trova tra la cultura e l'umanità. L'Esperanto è una lingua più etica che etnica, adottata come seconda lingua per libera elezione e non trasmessa "geneticamente" di padre in figlio. La sua neutralità rappresenta un veicolo capace di unire i popoli, senza tuttavia intaccare la lingua nazionale di nessuno di essi. Una comparazione con la metafora della torre di Babele evidenzia il suo spirito transnazionale e la sua valorizzazione delle diversità linguistiche. Infatti, il mito biblico può essere letto come reazione a forme di imperialismo e omogeinizzazione culturale. In questo senso, la lingua di Zamenhof appare come una "Babele opposta", in cui i popoli si avvicinano grazie alla lingua comune, anziché allontanarsi per le loro diversità.

Resumo: La disertacio argumentas, ke la plej profunda senco de Esperanto kuŝas inter kulturo kaj homaro. Esperanto estas pli etika ol etna lingvo, adoptita kiel dua lingvo per libera elekto kaj ne "genetike" transdonita de patro al filo. Ĝia neŭtraleco reprezentas ilon kapablan kunigi popolojn, sen tamen damaĝi la nacian lingvon de iu ajn. Komparo kun la metaforo de la Babela turo emfazas ĝian transnacian spiriton kaj ĝian valorigon de lingva diverseco. Fakte, la biblia mito povas esti legata kiel reago al formoj de imperiismo kaj kultura homogenigo. En ĉi tiu senco, la lingvo de Zamenhof aperas kiel "kontraŭa Babelo", en kiu popoloj alproksimiĝas danke al la komuna lingvo, sen tamen malproksimiĝi pro siaj diferencoj.